

LA SANKTA SPIRITO INSTRUOS VIN PRI PRI ĈIO

Komento al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Johano 14, 15-16.23-26

En tiu tempo, Jesuo diris al siaj disĉiploj: "Se vi min amas, vi observos miajn ordonojn. Kaj mi petos la Patron, kaj Li donos al vi alian Parakleton, por ke li restadu kun vi por ĉiam.

Se iu min amas, tiu observos mian vorton; kaj mia Patro lin amos; kaj ni venos al li kaj faros loĝon kun li. Kiu min ne amas, tiu ne observas miajn vortojn; kaj la vorto, kiun vi aŭdas, estas ne mia, sed de la Patro, kiu min sendis.

Tion mi parolis al vi, dum mi ĉe vi restas. Sed la Parakleto, la Sankta Spirito kiun la Patro sendos en mia nomo, instruos vin pri ĉio, kaj vin rememorigos pri ĉio, kion mi diris al vi.

La Pentekosta festo signas la transpason for de la antikva interligo. Fakte, en la tago mem, en kiu la juda komunumo celebris la donon, sur monto Sinajo, de la leĝo al Moseo, ĝuste tiam la komunumon de la kedantoj de Jesuo trafas la agadon de la Spirito: komenciĝas nova rilato kun Dio.

Kun Jesuo, kaj per la agado de tiu Spirito, la kredanto ne plu estas la obeanto al Dio pro respekto de Liaj leĝoj, tiuj transdonitaj al Moseo, sed la homo simila al Dio en la amo. Jen la donaco de la Spirito.

En ĉi Penetekosta tago la liturgio prezentas la evangelion laŭ Johano en ĉapitro 14 ekde versiklo 15; je la fino estas aliaj versikloj, kiuj kompletigas la sencon.

En la lasta vespermanĝo Jesuo lavis la piedojn de siaj disĉiploj, por ke ili estu kapablaj ami. Kaj nun amon Li petas: *"Se vi min amas..." amon Li petas unuafoje, kaj nur kiam ili iĝis amkapablaj, "..., vi observos miajn ordonojn"*. Jesuo en tiu vespermanĝo lasis nun nuran ordonon. Li diris: *"Novan ordonon mi lasas al vi"* (Joh 13, 34a) Tiu adjektivo "nova" ne signifas "plia", sed "anstataŭa. Kiu ĝi estas? ..."ke vi amu unu la alian, kiel mi amis vin (Joh 13,34b).

Do la ordono estas nur unu. Sed ŝajne estas pli multe da ili: Kial Jesuo diras: nun *"vi observos miajn ordonojn"*. Temas pri Liaj ordonoj, ne la Moseaj. Kaj ili resumiĝas en unu, tiu de amo. Ĉiufoje, kiam ĝi esprimiĝas, ĝi estas ordono. Do ne postuloj venantaj de ekstere, sed manifestiĝoj de profunda interna eco.

Kaj Jesuo daŭrigas: *"Kaj mi petos la Patron, kaj Li donos al vi alian Parakleton, por ke li restadu kun vi por ĉiam"*; Parakleto estas greka vorto; en antaŭa itala traduko estis elektita la vorto "konsolanto"; la plej proksima traduko en esperanto estas "sukuranto".

La sama esprimo en greka lingvo estis uzata por indiki la "defendan advokaton"; certe ĝi ne estis persona nomo, sed funkcio. Ni tenu la tradukon "sukuranto", sed atentu: la sukuranto povas esti vokita, se necese; la agado de la Spirito en la kristana komunumo "...restadu kun vi por ĉiam".

Kion signifas tio? La Spirito ne helpas en danĝero, sed agadas konstante. Tio estas garantiita al la komunumo de Jesuo. Dio ne helpas nur en momentoj de krizo aŭ sufero, sed ĉiujn momentojn Li anticipas.

Ne estas necese Lin voki aŭ petegi: ĉe la komunumo li estas ĉiam.

Kion diras ankoraŭ Jesuo? *"Se iu min amas, tiu observos mian vorton; kaj mia Patro lin amos; kaj ni venos al li kaj faros loĝon kun li. Johano en la prologo diris "La vorto fariĝis karno kaj loĝis inter ni" (Joh 1, 14). Ĉi tie Jesuo igas reala tiun aserton. Kiam ekzistas komunumo fondita sur amo, kiam tiu amo, donaco de Dio, iĝas amo al la fratoj, asertas Jesuo "kaj mia Patro lin amos; kaj ni venos al li kaj faros loĝon kun li. "*

Kaj estas la homo la nura vera sanktejo, el kiu radias kaj manifestiĝas la amo, la kompatado, la mizerikordo de la Patro. La Dio de Jesuo ne postulas

oferojn, Li mem sin proponas al la homo, deziras esti parto de lia vivo, por plilarĝigi lian amkapablon, kaj igi lin la sola vera sanktejo. Estas grava tiu deklaro de Jesuo. Dio ne estas plu en la templo, loko kien la personoj eniris post difinitaj purigaj ritoj, loko ne alirebla por ĉiuj, ĉar kelkaj sentas sin fortenataj. La celo de la nova templo, konsistanta en personoj, en la komunumo de Jesuo, estos la proksimiĝo al la malproksimumoj, al la rifuzitoj, kiuj ne povis aliri la templon. Estos mem la templo de Dio, kiu iros al ili. Jesuo daŭrigas: *"Kiu min ne amas, tiu ne observas miajn vortojn; kaj la vorto, kiun vi aŭdas, estas ne mia, sed de la Patro, kiu min sendis*

La vorto de la Patro enhavas energion kaj kreas forton. La akcepto de tiu vorto florigas la vivon en la komunumo. Kaj Jesuo konkludas: "Tion mi parolis al vi, dum mi ĉe vi restas." Ni proksimiĝas al la fino. Baldaŭ Jesuo estos arestita. Antaŭ la fino reaperas la vorto *Parakleto*: *"...Sed la Parakleto, la Sankta Spirito... unuafoje nomita tiel. La Spirito ne nur estas sankta, sed ankaŭ sanktiga: se iu el la mondo de la malbono kaptas ĝin, tiu estas siavice kaptita kaj trenata al la mondo de la bono"*

"...kiun la Patro sendos en mia nomo, instruos vin pri ĉio, kaj vin rememorigos pri ĉio, kion mi diris al vi". Tiu ne estas nova mesaĝo, sed emfazo pri la signifo de la mesaĝo de Jesuo. La agado kaj la ĉeesto de la Sankta Spirito en la kristana komunumo donos al tiu komunumo novan elanon en la kontentigo de novaj bezono de la personoj.